

Leterkesto, 3-a parto

La sufikso -i homonimo de io, samaj sufiksoj, diferenco inter fundamenta kaj faka sufikso, diferenco inter -i

Claude Gacond, 298-a radioprelego, 1969.06.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Restas en nia leterkesto kelkaj gravaj leteroj, kiuj tuŝas interesajn temojn. Pro tio hodiaŭ ni daŭrigas nian amikan babiladon kun niaj geaŭdantoj.

A.- Sinjoro Otto Prytz en Oslo, Norvegio, en sia letero, kiu estas tre interesa, skribas ĉe la adreso « **Norvegujo, -io, -lando** ».

Cl.- Li tute pravas, jen tri eblaj formoj.

A.- Li ne nur skribas pri la temo geografia nomenklature, sed ĉar ni deziras reveni al tiu temo, por pliklarigi iujn punktojn, ni citos eron pri tiu afero :

Cl.- Sinjoro Otto Prytz bedaŭras, ke li ne aŭdis la unuajn prelegojn de la serio geografia nomenklature, kaj li daŭrigas : « *Do mi ne povas funde komentarii la aferon, sed estas interese aŭdi la prelegojn, ĉar ili prezentas la problemon en iom nekutima maniero. Pluraj esperantistoj ne ŝatas, ke la sufikso **-ujo** estu uzata por landnomoj ; ili preferas **-io**. Sed la akademio ne oficialigis tiun sufikson pro tio, ke ĝi estas homonimo de la vorto **io**. Solvo estus reguligi la uzon de **-an** por la ŝtatanoj, konsiderante la **i** en **io** kiel parton de la radiko. Sed tiam ekestus tre longaj vortoj ; **norvegiano**, anstataŭ **norvego**. »*

A.- Sinjoro Otto Prytz poste donas aliajn ekzemplojn, kaj rimarkigas, ke la rezulto ne estus tre kontentiga. Kaj li konkludas :

Cl.- « *Ni ankaŭ konsideru, ke **-io** pli konformas al la finaĵoj de aliaj lingvoj : **-ia, -ie, -ien**. Mi supozas, ke la prelegserio ankoraŭ ne finiĝis, kaj kun intereso mi atendas la konkludon. »*

A.- Ni konstatas, ke prelegserioj estas bona metodo por devigi niajn geaŭdantojn al fideleco !

Cl.- Sed ni tuj klarigu, ke troviĝas nenia propaganda taktiko en niaj prelegaroj. Ni tute ne deziras vin devigi regule aŭskulti nin. Sed ni deziras pritrakti temojn, kiujn oni iom forlasas. Kaj ĉar mi estas arkivisto de gravega dokumentaro pri la internaciaj lingvoj, mi volas diskonigi niajn malkovrojn.

A.- Ni tute konscias pri la originaleco de niaj studoj. Ni provas rigardi sub nova lumo demandojn, kiuj ofte ne estis kontentige solvitaj. Kaj se ni kelkfoje iom vigle esprimas nian propran opinion, tio ne necese signifas, ke ni estas maltoleremaj por la ceteraj opinioj. Tute ne. Sed ni deziras aŭdigi vidpunktojn, kiuj ne estas sufiĉe diskutataj.

Cl.- Ni revenu al la letero de nia norvega samideano. Ne estas ĝuste aserti, ke la akademio ne oficialigis la sufikson **io**, oni prefere devus diri la sufikson **i**, pro tio, ke ĝi estas homonimo de la vorto **io**. Tio estas popola vidpunkto.

A.- Ekzistas en esperanto pluraj sufiksoj, kiuj devus esti forigitaj, se oni volus eviti ĉian homonimecon.

Cl.- Komence de la *Plena Vortaro de Esperanto* oni trovas en la tabelo de la sciencaj kaj teknikaj afiksoj la ĉi sekvajn sufiksojn :

A.- **-at**. Kemio : sufikso uzata por formi la nomon de acida salo : **klorato, sulfato**.

Cl.- Do esperanto posedas du sufiksojn **-at**, la partecipantan sufikson kaj la kemian sufikson.

A.- **-id**. Kemio : sufikso uzata por montri duelementan kombinaĵon sen oksigeno : **bromido**.

Cl.- Do esperanto posedas du sufiksojn **-id**, tiun, kiu signifas naskito, infano, kaj la kemian sufikson.

Leterkesto, 3-a parto

La sufikso -i homonimo de io, samaj sufiksoj, diferenco inter fundamenta kaj faka sufikso, diferenco inter -i

Claude Gacond, 298-a radioprelego, 1969.06.25 & 28

A.- **-il**. Kemio : Sufikso formanta radikalojn : **azotilo**, **karbonilo**.

Cl.- Do esperanto posedas du sufiksojn **-il**, tiun por la instrumentoj kaj la kemian sufikson.

A.- **-it**. Kemio : Sufikso uzata por formi la nomon de malpli acida salo ol -at : **klorito**, **sulfito**.

-it. Medicino : Sufikso por formi la nomon de organa inflamo : **apendicito**, **bronkito**.

Cl.- Do esperanto posedas tri sufiksojn **-it**, la partecipantajn sufiksojn, la kemian sufikson kaj la medicinan sufikson.

A.- Ni aŭdas vin respondi : sed tiuj sufiksoj apartenas al la faka lingvo. Mi tuj respondos : ĉu la geografia nomenklaturaro ankaŭ ne bezonas fakajn lingvojn ? Kaj se homonimeco povas ekzisti inter sufiksoj, ĉu homonimeco estas pli danĝera, kiam temas pri absolute diferencaj vortoj ? Ĉu vi jam trovis la korelativon **io** en la fino de vorto ?

Cl.- Fakte, kio diferencigas la fakajn sufiksojn de la fundamentaj, tio estas, ke ili ne estas memstaraj vortoj. Ido nur povas signifi : infano, filo. **Ilo** nur povas signifi instrumento. La fakaj sufiksoj estas uzeblaj nur en sia sufiksa loko. Do la homonimeco inter la korelativa **io** kaj la geografia sufikso **-i** komplete malaperas.

A.- Ni provis pruvu en nia prelegaro, ke en la *Plena Vortaro de Esperanto* la difino de la landforma sufikso **-i** estas erariga, ĉar ĝi kredigas al sinonimeco kun la sufikso **-uj**. Pro tio multaj esperantistoj kredas, ke la elekto inter la sufiksoj **-i** aŭ **-uj** estas afero de persona ŝato. Se vi atente aŭskultis niajn prelegojn, vi verŝajne konvinkiĝis, ke fakte ne estas tiel. La personaj ŝatoj ne havas la finan vorton. Formoj kiel **Holandujo** malaperis, ĉar ili estas eraroj, idiotismoj. Formoj kiel **Patrujo**, **Esperantujo** de si mem nenion signifas. Kaj tion oni necese iom post iom malkovras. **Ujo** fakte signifas **entenilo**, do patrujo ne povas signifi patrolando, sed io kiel ĉerko, lito.

Cl.- Iom post iom la sufikso **-uj** cedas rolojn, kiuj ne estas konformaj al ĝia signifo. En botaniko oni rezignis pri vortoj kiel kafujo, teujo, pomujo profite al kafarbo, tearbo kaj pomarbo. En geografio la sufikso **-uj** povas konveni por la landnomoj formitaj helpe de gentradiko, kiel por Norvegujo. Sed tiam ni ricevas nomon, kiu metas la akcenton sur la gento mem.

A.- Ni vidis, ke la sufikso **-i** nur signifas teritorio karakterizata de. Do fakte Norvegio ne estas vera sinonimo de Norvegujo. La ekzemplo **homujo** kaj **homio** tion provis komprenigi. Humujo signifus la Teron kun la homoj, homio signifus la teritorion karakterizatan de la homoj. Germanujo estas la lando de la germanoj, Germanio estas la lando karakterizata de la germanoj. Jen granda diferenco. En Germanujo svisento sentas sin fremda, en Germanio tute ne.

Cl.- Tiuj klarigoj ne estas bazitaj sur teoriigado, sed sur la analizo de la ekzaktaj signifoj de la konstruoj Norvegujo, Norvegio, Germanujo, Germanio.

A.- Estas sufiĉe kompleksa afero, kiu solviĝos iom post iom.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-